Ludwig Lazarus Zamenhof,

Nia lingvo

Nia lingvo Esperanto
super ĉio en la mond'!
Ho kreskadu la anaro
de pacema granda rond'.
Kaj fermiĝu, per kompreno
de malpaco, ĉefa front':
Nia lingvo Esperanto
super ĉio en la mond'.

Ni ne perdu la kuraĝon,
alta estas nia cel'.
Nur antaŭen! Nia stelo
alte brilas en ĉiel'!
Por la lingvo Esperanto
disvastiĝos granda hel':
Ni ne perdu la kuraĝon,
alta estas nia cel'.

Nia lingvo Esperanto
super ĉio en la mond'!
Ĝis popoloj pli liberaj
sin komprenos en la mond':
Ni laboru ne laciĝe
por la venko en estont'!
Nia lingvo Esperanto
super ĉio en la mond'.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-352-698 (2006-03-14 17:57:51)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi kanto-tekston en la libreto "Esperanto-Sangbogen", eldonita en 1941 de "Dansk Arbejder Esperanto Forbund" (= Dans Laborista Esperanto-Ligo) kaj "Dansk Esperanto Selskab" ("Dana Esperanto Asocio)". Kiel verkinto estas indikita tie: L. L. Zamenhof. Mi ricevis la libreton en 2006-02-15 de s-ro Lars Kromann Jensen (Stenbrydervej 6, DK-4640 Fakse, Danio). Indikita estas super la teksto, ke ghi estu kantata lau la melodio de la germana nacia himno (Deutschland, Deutschland über alles). - La verkinto tre verŝajne ne estas Zamenhof, laŭ informo de s-ro Christian Zimpa (Esperanto Muzeo Vieno).